

Kun Tiburcjusz Tiblewsky pri nova romano de Claude Piron

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.05.25.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-170/Radiokasedo-170-11-86-B-1058-Claude-GACOND-kun-Tiburcjusz-Tiblewsky-Pri-nova-romano-de-Claude-Piron.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas Claude Gacond kaj Tyburcjusz Tyblewski pri nova romano de Johán Valano.

TT.- Ĝia titolo estas: "Ili kaptis Elzan". Eldonita de "Fonto" en Brazilo, ĝi apartenas al serio de libroj konceptitaj por tiel nomata "facila Esperanto". Pli frue aperis en sama eldonejo: "Gerda malaperis" kaj "Lasu min paroli plu" - ambaŭ sub efektiva nomo de la aŭtoro, kiu estas Claude Piron - la belgdevena ĝenevano. La aŭtoro havas jam firman renomon inter kaprica esperantista legantaro. Ni ne riskas multon, konstatante ĉi tie ke: Piron - Valano signifas kvaliton! Ni konstata ankaŭ, ke tiu subtitolo "Romano en facila esperanto" estas la plej honesta promeso ĝui la enhavon. Verŝajne la speco de valana talento esprimiĝas en tio, ke li kapablas konstrui komplikajn rakontojn, surprizajn intrigojn, komplete neatenditajn solvojn, uzante la plej simplan lingvon. Laŭ tiu kriterio Valano reprezentas modelan aventur-stilon, kiu en naciaj lingvoj garantias al la aŭtoraro centmilojn da legantoj. Gersi Bays ne presas eldonkvanton, sed supozeble ne aperis pli ol 2 mil. Pensige, ĉu? Ĉi-libre unuan fojon ni trovas la spuron de familia kunlaboro; la kovrilpaĝon belstile ilustris Geneviève Piron. Tio vere bonaŭguras por la estonteco!

Cl.- Kaj nun, kiu estas tiu Elza ?

TT.- Flegistino, belulino, sendependa persono.

Cl.- Ankaŭ tion mi trovas karakteriza; Valano maloftege prezentas malbelajn virinojn, ĉu pro estetika prefero?

TT.- Ĉi-kaze tamen estas iu klare malbela sinjorino; ŝi estas grafino Montekalva. Aŭskultu: "Malbela, sed supere inteligenta virino, konata kiel ridema ĝojulino, ĉiam ema ŝerci kaj aliri la vivon el plej pozitiva angulo; kvankam fojfoje impresa, ŝi estis, laŭdire fakte simpla persono, kun simpla rigardo al la mondo".

Cl.- Do, malbela, sed kun kiom da pozitivaj ecoj! Kaj entute plejpartas tamen la ĉarmaj sinjorinoj: Diana Belpar, pro kiu la suno brilas pli klare; Elza Najtingál mem, pro kiu mankas la spiro. Nur Elvira estas "same dika kiel la edzo, sed pli malalta".

TT.- Kion vi volas esprimi per tio; ke nur virinoj estas belaj ĉe Valano?

Cl.- Ne, ĝuste ne nur; ĉe li plejpartas la belaj, logaj homoj. Se aperas perfortulo aŭ embuskulo, amkaŭ li estas iel ĉarma!

TT.- Jes. La intrigo de tiu ĉi libro ĉefas pro ĥemiista inventaĵo, pro la likvaĵo, kiu metita en trinkaĵojn kaŭzas rigidajn songojn kaj dormigas. Oni provis ŝajnigi perfortan rabon de la grafino por glorigi iun gravan viron, sed la plano fiaskis.

Cl.- Kaj kio okazis?

TT.- Ne, tion mi ne rajtas diri, sed se vi legos la libron, la solvoj certe surprizos vin. Kaj io aparte loga estas, ke li - Piron - konstruas la rakonton laŭ psikologia probableco kun plena konscio. Aŭskultu: "Sed ne sufiĉas imagi, ke oni estas singarda, por sin gardi efike. Homo fuŝema restas fuŝema, eĉ kiam li zorgas atente, ĉar la mensaj kaŭzoj, kiuj igas fuŝema, ne malaperas pri simpla kunstreĉo de la volo sukcesi".

Cl.- Ĉu estas iu fuŝulo en la libro?

TT.- Jes, estas iu Ĝeraldo, kies agojn la aŭtoro eĉ piednote klarigas per du sciencaj verkoj pri psikopatologio de Freud kaj de Laforgue.

Cl.- Tuj oni rekonas, ke psikologo kreis la personojn; kaj vere gravas, ke li faris tion kompetente, ne puŝante leganton en falsajn spurojn de la homa psiko.

TT.- Jes. Kaj evoluo de la eventoj sekvas tre nature, kvankam la aŭtoro ŝparas al la legantoj troon da ĉi-gvidaj detaloj. La sinsekvaj scenoj okazas bonritme kaj enigme en tioma grado, ke oni volas ekkoni la veron. Tio forte motivigas ne meti la libron flanken.

Cl.- Ekzemple tiu fragmento: "Homo eĉ inteligenta kelkfoje fuŝas siajn planojn pro troa memcentreco. Nikolao ĉiam dormas kun fermita fenestro, kaj la ideo ne venis al li, ke aliaj homoj vivas alimaniere. Tiai li ne demandis al Elza, ĉu la grafino enlasas tutnokte freŝan aeron en sian dormĉambron, kaj li forgesis diri, ke lia gasa dormigilo funkcias plene nur ĉe fermitaj fenestroj. Ĉe nia aerŝata grafino, la dormiga efiko estis nur parta. Pro tio la bruoj vekis ŝin".

TT.- Aparte atentinda estas en tiu ĉi kaj en aliaj valanaj libroj la interpunkcio. Kiam vi legas la frazojn, ili ne lasas dubon, kiu estas la ĉefa, kiu la suba aŭ kiu la kun-parto. Mi volas tion emfazi, ĉar verŝajne pri tio ne estas en esperanta literaturo tro da identeco. Dume la komo kaj punktokomo povas tiel helpi en mastrado de la vortoj, en ilia klara kaj bela frazigado.

Cl.- Permesu do ankoraŭ unu fragmenton: "Vi pravis, Cipriano, vi tute pravis, kaj mi gratulas vin. Nu, Cipriano, ĉu vi aŭdis, ke mi plej hazarde renkontis, en neforgesebla momento, la unuan amon de mia vivo?"

TT.- Do, la kiasika bon-fina romano, kiun valoras tralegi por iom da optimismo, kiun ĝi garantias.

(muziko, kantas Claude Piron)

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Tyburcjusz Tyblewski raportis pri la lasta romano de Claude Piron kaj aŭdigis unu el liaj kanzonoj. Ĝis la venonta sabato!